# *Prezidento de Kubo kontrolas preparojn por la nova lerneja jaro*




**Nova lernojaro en Kubo**

Havano, a?g 29 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel  gvidis a analizon ?i-merkredon en la Palaco de la Revolucio (?efsidejo de la Registaro) de preparoj por la lerneja jaro 2024-2025.

En la kunveno oni diskutis pri la ?efaj problemoj kaj potencialo de la sektoro, kiel la materia sekureco de la kurso, kaj malfacila?oj en la disdonado kaj merkatado de lernejaj uniformoj, ?i-lasta afero, kiun la kuba prezidento klopodis solvi kiel eble plej rapide.

Oni informis, ke malgra? la ekonomiaj problemoj, kiujn trapasas la lando, libera aliro al edukado estas garantiita por preska? du milionoj da kubaj infanoj, adoleskantoj kaj junuloj.

La? la ministrino pri edukado, Naima Trujillo, ?i tiu estos malfacila kurso, sed nenio malhelpos pli ol unu milionon 600 mil studentojn ?eesti klas?ambrojn sub la principo de universaleco kaj senpageco.

"Preska? neniu lando, ne nur en la regiono, povas aserti tion", diris la oficisto en nacia televido, elstarigante la postulojn en la ekonomia kampo kaj la celon atingi la bezonatan kvaliton en la procezo kaj atingi ?iujn junulojn.

Inter la novaj aspektoj por tiu ?i kurso estas la alveno al la lando, dank' al internacia kunlaboro, de granda parto de la lernolibroj, kiuj akompanos la trian plibonigon de la ?enerala edukado en Kubo.

Unu el la temoj por reliefigi inter la kompleksa?oj estas ke ?i estas unu el la kursoj plej bone certigitaj per bibliografio (lernolibroj, laborlibroj kaj bildaroj), same kiel aliaj instrumaterialoj.

Al la 1.600.000 studentoj de ?enerala edukado aldoni?as la 240.000, kiuj ?i-jare estas enskribitaj en supera a? universitata edukado.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/363961-prezidento-de-kubo-kontrolas-preparojn-por-la-nova-lerneja-jaro

Radio Habana Cuba